

# ***Kluba Bulteno***

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 2 2018**

**Ĵaŭdon la 15an de marto**

**66a jaro**

---

## **Kalendaro**

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

### **Lundon la 19an de marto** (semajno 12) *mandag*

La ĵusa (sabata) renkontiĝo kun la publiko en la biblioteko de Bjerke: Raporto kaj plitakso.

*Lørdagens møte med publikum på Bjerke bibliotek: Rapport og vurdering.*

### **Mardon la 3an de aprilo** (semajno 14) *tirsdag*

Ni konatiĝos kun la libroj k.a., inkl. liter-ludo (*Scrabble?*), postlasitaj de nia prezidinto Pepita.

*Vi ser igjennom bøkene o.a., inkl. et bokstavspill (Scrabble?) som klubbens tidl. leder Pepita har etterlatt.*

### **Lundon la 16an de aprilo** (semajno 16) *mandag*

Studkunveno. Ni pludiskutos malnetan tradukon de broŝuro pri malnovaj metioj.

*Studiemøte. Vi fortsetter å diskutere oversettelsen av en brosjyre om tradisjonelle håndverksyrker.*

### **Lundon la 14an de majo** (semajno 20)

Kromkunveno: La ĵusa skandinava kongreso enŝipa . Raporto kaj pritakso.

*Ekstramøte: Den skandinaviske kongressen på danskebåten forrige helg: Rapport, vurdering.*

### **Mardon la 5an de junio** (semajno 23) *tirsdag*

Anna Maria: Psikologia fundamento de Esperanta lingvo + bazaj informoj pri lingva psikologio. Vidu p. 2.

*Anna Maria Psykologisk fundament for språket esperanto + grunnfakta om språkpsykologi. Se s. 2.*

### **Lundon la 18an de junio** (semajno 25) *mandag*

Anna Maria: mitologiaj rakontoj kaj ilia influo al nia kulturo Vidu p. 3.

*Anna Maria: Mitologiske fortellinger og deres betydning for vår kultur. Se s. 3.*

# OKAZIS

## **La nova jaro 2018** (2.1)

Kiaj perspektivoj por Esperanto en 2018? Se tiajn ĝi havu, ni devos reaktiviĝi alekstere: loka biblioteko, Vizaĝopaĝo ....

## **Traduk-kunveno** (15.1)

Ni daŭrigis nian tradukadon de "Malnovaj metioj".

**Novuloj ne venis** (6.2 + 7.2) Ni invitis novulojn, sed neniu venis. (Eble la teamo de *lernu.net* ne afiŝis nian inviton en la kursa Vizaĝopaĝo.)

## **Diskuto pri infomaterialo** (19.2)

Ni diskutis i.a. ĉu aĉeti rulafiŝon, ĉar tian havas ĉiuj aliaj organizoj. Kontraŭ tio: Homoj rigardas ne nian (malnovaspektan) stativon, sed la afiŝojn sur ĝi; ni povas ankaŭ plene kovri ĝin per pliaj afiŝoj; rulafiŝo kostus ĉ 1200 kr. Laŭ nia gastaktivulino, Anna Maria, niaj afiŝoj kaj flugfolioj estas bonaj, sed ni bezonas aktivulojn.

## **Vizito de Vinilkosmo** (26.2)

Kromkunveno kun Floréal Martorell, la mastrumanto de Vinilkosmo. Li alportis tri k-diskojn por recenzo.

---

## **Pri la kunveno mardon 5an de junio**

"La limoj de mia lingvo estas la limoj de mia mondo" skribis iam Wittgenstein. Diversaj esploroj montris, ke ne nur realeco influas lingvon (kio estas komprenebla, ni konstruas nomojn por novaj maŝinoj, eventoj, ktp), sed ankaŭ la uzata lingvo influas nian perceptadon de realeco. Pro tio estas ege valore scii, kiu psikologio formis la lingvon, kiu nun formas nian percepton. Dum la kunveno mi rakontos pri metodoj de lingvoesplorado kaj ni kune povos analizi diversajn aspektojn de la internacia lingvo.

Anna Maria

---

## **Kromekzempleroj**

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Ankaŭ multaj pli malnovaj. Senpage preneblaj!

---

**Urnedsettelse.** Kom til Asker kirke 1. juni kl. 12, da blir det urnedsettelse av Pepita. Alle i E-klubben er velkommen – Tor Antonio

## La jarkunveno / Årsmøtet, mardon 6. marto

Ni aprobis la **jarraporton** kun la jenaj aldonetoj:

B. Interna agado, 3. alineo:

Ni ricevis en 2017 ankaŭ 2100 kr kiel subvencion por 2016.

B. Interna agado, lasta alineo, ni luigis ankaŭ unu vesperon al aliaj najbaroj. Nova teksto:

La domo – luigo. En 2017 luis la kunven-ĉambron nia propra domanaro/ *sameie* – kaj unu (1) najbara – por siaj jarkunvenoj. Nia propra domanaro luis ankaŭ por unu kromkunveno, kaj foje ni luigis dumtage al filmantoj.

Ni aprobis la **jarkalkulon** (kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn) kun la jenaj aldonetoj:

Aldona noto: "Donacoj" inkluzivas la kapitalon de la nun ne funkcianta Studenta E-Societo: 3288 kr.

En la bilanco: Post "Ŝuldoj" aldoniĝu:

Bonhavo. 60 % de lu-pago de najbaroj 600 kr.

### Elektoj

Ni reelektis la jenajn:

Prezidanto: Kjell Peder Hoff

Sekretario: Douglas Draper

Kasisto: Harald Rygg

Anstataŭantoj: Ni reelektis Ellen Dalen kaj Jacob Grevstad (kvankam ĉi-lastaj studas en Trondh'm).

Revizoro: Terje Meier (reelektokondiĉe ke li akceptos)

Kluba reprezentanto en la domkomisiono: Ni reelektis Kjell Peder Hoff.

Anstataŭantoj (po unu) por la revizoro kaj la domkomisiono mankas.

Elekta komisiono: ne elektita.

---

## Pri la kunveno lundon 18. junio

Ĉiujn partoprenontojn ni petas rememoriĝi kaj prepari favoratan rakonton de mitologio (nordia, samea, romia, greka) – tiun, kiu plaĉas al vi). Ĉiu kurte rakontos kaj poste ni havos oportunon diskuti: ĉu mitologio estas grava en nuntempa mondo? Kion ni povas lerni de malnovaj dioj? Kian influon havas mitologio al nia kulturo kaj nia vivo? – Anna Maria

---

## Info-budoj en foiroj?

**Se vi scias / aŭdos** pri ia foiro, kunveno, konferenco aŭ festivalo, kie eblus starigi informbudon (senpage a ŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. . Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

# Kompaktdiskoj

Lastsemajne vizitis nin en Esperantonia Floréal (Flo') Martorell el Toulouse (suda Francio), kiu fondis kaj mastrumas *Vinilkosmo*, firmaon kiu surmerkatis Esperanto-muzikon. Flo' kunportis tri kompaktdiskojn por ke iuj recenzu ilin en *Norvega Esperantisto*. La diskojn rajtos konservi la recenzintoj. Jen iom pri ili:

---

## **Vojaĝo Planedo nia** (2017)

*Vojaĝo* estas la historio pri la amikeco inter ses muzikistoj de Toulouse, la Rozkolora Urbo en Okcitanio. Kunigitaj de komuna pasio por latina muziko kaj ĵazo, ĉi tiuj "vojaĝantoj de la Sudo" forĝas komponojn kun la spontaneco, entuziasmo, kaj varmo de la Sudo.

Kaj pli vi trovos interrete ĉe [vinilkosmo-mp3.com/eo](http://vinilkosmo-mp3.com/eo) → [dekstre, kategorioj] Kanzono tradicia ... → Vojaĝo

## **"Bosniumas" Espo Despo** (2016)

Espo Despo estas internacia grupo kiu elfaras kantojn kun originalaj tekstoj verkitaĵoj en Esperanto. La bando havas sian bazon en Kopenhago, Danio. La membroj estas de bosnia, germana, kaj usona origino. .

Vidu interrete ĉe [vinilkosmo-mp3.com/eo](http://vinilkosmo-mp3.com/eo) → [dekstre, kategorioj] Popo-Roko ... → Espo Despo

## **jOmO okcitanas** (2016)

Li ludas surstrate en la diversaj karnavalaj, patronaj festoj kaj paradmarŝoj de la regiono. Ege festuma, ĝoja, kaj danciga, ilia repertuaro prenas siajn radikojn en la tradiciaj okcitanaj kanzonoj.

La tekstoj de la albumo prezentas diversajn aspektojn de la kulturo de Okcitanio, de la sociaj luktoj al la pasio pri rugbeo, tra la vina aŭ karnavala tradicio, kaj la lukto de la lingvo por supervivo.

Vidu interrete ĉe [vinilkosmo-mp3.com/eo](http://vinilkosmo-mp3.com/eo) → [dekstre, kategorioj] Popo-Roko .... → JoMo [bildo] → [malsupre] JoMo okcitanas

---

Venu kaj prenu! aŭ – vi mendos, ni sendos

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.  
Vd. pli detale interrete ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) => "vojklarigo".

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizonu pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).